

KONFERENCO PRI ESPERANTO EN MEKSIKA UNIVERSITATO

La jhaudo 21-a de februaro 2013 estis Konferenco pri Internacia Lingvo Esperanto en la audejo Gabino Fraga de la Fakultato pri Juro (FpJ) de la Universitato Nacia Autonoma de Meksiko (UNAM), ekde la 3-a ghis la 5-a horo vespere.

Prelegis Luis L. Kordova Arejano (LLKA) kaj Mylai Burgos Matamoros (MBM); ambau estas profesoroj en la FpJ.

LLKA esprimis ke Esperanto estas Internacia Lingvo (ILo) por egaleca kaj demokrata komunikado inter la homoj de chiuj popoloj de la mondo; ke Esperanto ne apartenas al iu ajn nacio, sed al la homaro; ke Esperanto estas facile lernebla (sed kompreneble, oni devas studi ghin por lerni ghin); ke per Esperanto esperantistoj povas vojaghi kaj resti kun gastigantoj per "Pasporta Servo", fondita de Ruben Feldman Gonzalez; per Esperanto, esperantistoj povas partopreni che naciaj au internaciaj kongresoj au korespondi kun aliaj esperantistoj.

Ankau, LLKA komentis ke Esperanto estis agnoskita de UNESKO dum la jaro 1954 kaj 1985 kaj iomete komentis pri Ivo Lapenna; li komentis pri la biografio de Ludoviko Lazaro Zamenhof kaj legis la poemon "ho mia kor"; parolis pri Grabowski; pri la unua kongreso de Esperanto en Francujo dum 1905; iomete pri la gramatiko, ABC kaj pri Juan de Oyarzabal, la unua profesoro de Esperanto en UNAM dum la kvindekaj jaron de la 20-a jarcento.

Poste, MBM parolis pri juro kaj Esperanto (speciale pri demokrateco de Esperanto) kaj legis la multajn salutmesaghojn de Esperantistoj por la konferenco.

Ni ricevis salutmesaghojn el 19 landoj: Albanujo, Belgujo, Brazilo, Chinujo, Demokrata Respubliko de Kongo, Francujo, Hindujo (Barato), Hispanujo, Hungarujo, Irlando, Italujo, Japanujo, Kubo, Meksiko, Nederlando, Rusujo, Usono, Venezuelo kaj Vjetnamujo.

La konferenco finis je la 5-a horo vespere kaj la gestudentoj estis invititaj partopreni en la Kurso de Esperanto en UNAM kiu komencos la sabaton 23-a de februaro 2013 ekde la 10-a horo matene ghis la 1-a horo vespere.

Raportis: Luis L. Kordova Arejano (luisesperanto@yahoo.com), Urbo de Meksiko, la 21-an de februaro 2013.



Conferencia de Esperanto, 21 de febrero de 2013, Facultad de Derecho, UNAM



Conferencia de Esperanto, 21 de febrero de 2013, Facultad de Derecho, UNAM



Conferencia de Esperanto, 21 de febrero de 2013, Facultad de Derecho, UNAM



Conferencia de Esperanto, 21 de febrero de 2013, Facultad de Derecho, UNAM



Conferencia de Esperanto, 21 de febrero de 2013, Facultad de Derecho, UNAM



Conferencia de Esperanto, 21 de febrero de 2013, Facultad de Derecho, UNAM